

John Ellerton,  
 Du lässt den Tag, o Gott, nun enden  
*tradukita de Raymund Weber*

Argiope-informo:  
 La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.  
 Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

John Ellerton,  
 Forpasis tiu tag', Sinjoro  
*tradukita de Frieder Weigold*

1. Forpasis tiu tag', Sinjoro,  
 Kaj profundigas la senlum'.  
 Vi gardis nin de ajn doloro.  
 Nin gardu ankaŭ dum noktum'!

2. Ni rotacias en la tagon.  
 En nokta paco dormas ni.  
 Kaj portas lumon trans la maro  
 La suno, kie brilas ĝi.

3. Senĉese kiel la mateno  
 Briladas super tera rond',  
 Eksonas laŭdo pro la beno  
 Al ĉiu sur la vasta mond'.

4. La suno, kiu ĵus subiris,  
 Ja brilas en plu fora land'!  
 La gloron, kiun ni admiris,  
 Anoncas plu preĝada kant'.

5. Pereas regnoj. Tiel estu!  
 Kaj sole staras via tron',  
 Ke sole via regno restu  
 Je fina tag' sub unu kron'.

...

John Ellerton,  
 Ni estis ja en mano Dia  
*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1. Ni estis ja en mano Dia,  
 dum brilis super ni la Sun'.  
 Protektu nin per mano Via  
 dumnokte, Dio, ankaŭ nun!

2. La ter' cirkulas ĝis la veno  
 de l' nova tag', ripozas ni  
 dum tiu nokt' en Via beno<sup>2</sup>  
 ĝis la mateno, kara Di'.

3. Nun kiam en malhel' fordronas  
 la Sun' en tiu ĉi vesper',  
 multvoĉe Via laŭdo sonas  
 alialoke sur la Ter'.

4. Ĉar kiel estas ĉirkaŭanta  
 la Teron lumo de l' maten',  
 senĉese estas plusonanta  
 preĝado de la homoj jen.

5. Ja estas, Dio ĉiopova,  
 senlima Via regno, nin  
 konduku al la tago nova  
 en Via regno je la fin'!

...

<sup>2</sup>aŭ: dankante Vin pro Via beno, Vin adorante, kara Di'.

Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en la Germanan de Raymund Weber.

Arg-130-256 (2008-11-08 15:30:25)

Diese Übertragung ins Deutsche ist abgedruckt in dem Gesangbuch der Katholischen Kirche in Deutschland “Gotteslob”, in der neueren Ausgabe. Der Text mit den Musiknoten findet sich auch auf der Heimseite [http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,\\_SS\\_Benedictus\\_XVI,\\_Ves\\_er\\_in\\_der\\_Kathedrale\\_in\\_Muenchen,\\_GE.pdf](http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf).

Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de Frieder Weigold.

Arg-130-932 (2008-11-08 14:22:49)

Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun ĉi tradukon de la kanto en 2008-11-06 de sinjoro Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim, Germanio), kiu mem faris la tradukon en Esperanto. S-ano Weigold verkis tiun tradukon - kiel li diris al mi - laŭ la germanigo farita de s-ro Raymund Weber. Tiu germanigo estas trovebla en la germana katolika kant-libro “Gotteslob” (= Laŭdo de Dio), n-ro 981, pli nova eldono. La teksto kun la muzik-notoj troveblas ankaŭ en la retejo [http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,\\_SS\\_Benedictus\\_XVI,\\_Ves\\_er\\_in\\_der\\_Kathedrale\\_in\\_Muenchen,\\_GE.pdf](http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf).

Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-01-10.

Arg-130-257 (2008-11-08 00:42:46)